# ESPERANTA FINNLANDO

1961

N:o 1

INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

**JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj**
Abonprezo enlanda 350 mk
eksterlanda 450 mk
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto 8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj anoncoj): Männikkötie 5 M 67, MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, interŝanĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## Suomi ja Ruotsi ja ulkomaat

Suomen Kuvalehden numerossa 48 on Henrikki Uittoniemi selvästi ja vakuuttavasti osoittanut, kuinka puutteellisia suhteemme pohjoismaihin ovat kielellisten vaikeuksien vuoksi. Siinä määrin, että hävettää tunnustaa, että ilman ruotsinkielistä vähemmistöämme »Suomi olisi vain länsimaistunut itämaa — vai oliko se päinvastoin?» Miten sitten ovatkaan suhteemme Eurooppaan ja valtamerien taa?

Entä olemmeko yksin? Tunnettu ystävämme ja Kalevalan ruotsintaja Björn Collinder on sanonut: »Olemme kaikki kuulleet huvipaikoilla ulkomaisen markkinapellen rääkkäävän ruotsinkieltä naurettavalla, jopa ällöttävällä tavalla. Ajatelkaapa nyt tällainen mies raidallisissa housuissa ja pitkässä mustassa takissa pitämässä syvästi liikuttavaa puhetta avonaisen haudan partaalla — niin voitte aavistaa, miltä englantilaisesta tuntuu, kun koulunkäynyt keskitason ruotsalainen — ehkäpä niitä, jotka innokkaimmin puoltavat englantia maailmankieleksi — puhuu englantia juhlavassa tilaisuudessa.» Ja me kun olemme uskoneet, että englanninkielen taito on valtavasti levinnyt Ruotsissa!

Ja sitten ne YK:n yleiskokoukset ja muut kansainväliset kongressit ja konferenssit, joissa ihmiset panevat kuulotorvet korvillensa — ei kuullakseen paremmin, mitä puhujalla on sanomista, vaan seuratakseen sillä kielellä mitä vähimmin puutteellisesti hallitsevat, miten tulkki on tajunnut puhujan sanat. Jos kuuntelija nimittäin ei sattumalta osaa äidinkielenään jotakuta niistä etuoikeutetuista kielistä, joita tulkit käyttävät.

Ehkäpä joku lukija tahtoisi moittia, että teemme pilkkaa ihmisneron huippusaavutuksista visaisen kielipulman ratkaisemiseksi. Mutta ovatko nämä mitään huippusaavutuksia? Eihän tarvitse muuta kuin poistaa silmälaput ja korvatulpat ja ennakkoluuloitta tutustua kilpailevaan ratkaisuun, kansainväliseen kieleen.

Onhan maailman arvovaltaisin kulttuurijärjestö UNESCO antanut tunnustuksensa Esperanton pyrkimyksille ja tähänastisille saavutuksille, ja viimeksi kehoittanut kaikkia jäsenvaltioita viettämään kielen pe-



KUL
V- 18579

rustajan satavuotismuistoa tämän vuoden puitteissa.

»Paljonko sitten on esperantotaitoisia?» on varmaan teidänkin vastakysymyksenne. Mutta onko tällä mitään oleellista merkitystä? Jos voimme näyttää, että kaksituhatta tai kymmenentuhatta henkilöä 65 maasta sataprosenttisesti ymmärtää toisensa keskustelussa, yleistajuis-tieteellistä luentoa kuunnellessaan tai näytelmää katsellessaan, että satatuhatta tai ehkä miljoona ihmistä kaikista maapallon kolkista on jatkuvassa kirjeenvaihdossa kaskenään uudella kielellä, niin mitä lisätodistusta ne muut miljoonat voisivat antaa? Jos tämä kieli on runsaan puolen vuosisadan kuluessa kyennyt luomaan alkuperäisen kirjallisuuden, jonka runopukuista osaa edustaa kaksi vuotta sitten julkaistu 600-sivuinen antologia — 350 runoa, jotka on kirjoittanut 90 runoilijaa 35 maasta — jonka ei tarvitse kainostella suurten kulttuurikielten runouden rinnalla — niin mitä muuta tarvitaan osoittamaan sen elinkelpoisuutta.

Kenties on syytä mainita lasten »leikkikongressi» viime elokuussa Belgiassa pidetty, johon osallistui 87 lasta 10 maasta leikkien, retkeillen, esittäen näytelmän, mutta ennen kaikkea esteettä jutellen keskenään, tietenkin ilman tulkkeja. Eiväthän kongressin tädit osanneetkaan esim. suomea, ja meiltä osallistuvat Someron Yhteiskoulun oppilaat olivat vain vuoden, toiset pari opiskelleet esperantoa. Paikalla käynyt englantilainen opettaja nimenomaan kehui heidän kaunista kieltään saamassani kirjeessä.

Johtopäätöshän on selvä: vaikka nykyhetken johtajamme eivät viitsisi tai saisi aikaan oppiakseen kielen (=parin kuukauden iltahetkien uhraus), niin ottamalla esperanton oppiaineeksi kouluihin »saisimme yhden miespolven vaihtuessa aikaan KIELELLISEN VALLANKUMOUKSEN jonka vaikutuksesta tuleva sukupolvi ymmärtäisi toinen toistaan koko maapallolla», Tanskan sisäasiainministeriä lainataksemme.

Vilho Setälä

---

## NOVA FONDAĴO
## MEMORIGA FONDAĴO PROF. DRO. CANUTO.

La ĝenerala sekretario de Universala Esperanto-Asocio, profesoro Ivo Lapenna informas, ke la estraro de UEA decidis establi specialan fondaĵon sub suprepresita nomo. La celo de la fondaĵo estas efektivigi pli efekte la »adoptan» agadon inter la membraro de la asocio, tio estas, tra la fondumo oni povas pagi, krom sian propran, aldonajn jarpagojn de UEA, tiel ebligante al iu aŭ iuj samideanoj el nepagipovaj landoj membrecon en la UEA. Ĉiu paginto povas esprimi sian deziron pri la persono, kiun li volus per sia pago membrigi, sed se tia deziro ne estas esprimata, prizorgos la Centra Oficejo de UEA pri elekto de konvena membro.

»Esperanto», la oficiala organo de la asocio aperigos regule la nomojn de kontribuantoj al la fondumo. Profesoro Lapenna, kiu inicie proponis pri la starigo de tiu ĉi fondaĵo, volis per sia propra ekzemplo akceli ekfunkciadon: li mem tuj pagis al la asocio 5 Membro-Abonanto-kotizojn por 1961. Estis bona startpafo, ĉar tuj, dum kelkaj tagoj nur, la fondumo povis kolekti 26 MA-jarpagojn.

Kontribuaĵojn akceptas la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj, ni ja memoras, ke nia propra ĉefdelegito estas samideano Joel Vilkki el Somero. Certe la legantoj volas ree memori la numeron de lia poŝta ĝirokonto; ĝi estas Tu 60 253.

Ĉu ne estus bele trovi sian nomon en iu plejeble proksima numero de Esperanto? Pripensu, kara leganto, la aferon !

Arvikolo

Tempoj ŝanĝiĝas. En antikva tempo la viroj faris hejmtaskojn kaj laborojn.

Ĉu vi ne legis, ke Abrahamo kaj lia servisto rostis ŝafidrostaĵon por siaj gastoj, dum Sara nur staris kaj ridis? Kaj ĉu vi sciis, ke en tempo de Malnova Testamento viroj naskis infanojn? Abrahamo naskis Isakon, Isako naskis Jakobon k.t.p. *)

Nun ĉio estas ŝangita. Virinoj naskas infanojn kaj faras de frua mateno ĝis malfrue en vespero la hejmlaborojn. — Povas okazi ke edzo ankoraŭ dormas dormon de justuloj, dum lia edzino iras en laktobutikon kaj aĉetas du litrojn da lakto, flakonon da kremo, panon, buteron, ovojn, acidan lakton ktp., kaj laciĝita sub la peza ŝarĝaĵo, portas retsakon hejmen. Post matenmanĝo ŝi purigas ĉambrojn, lavas vazojn, telerojn kaj viŝas polvon.

Estas bonŝanco, se edzo ne estas hejme. Se li e s t a s hejme — estas diablo malligita. Li, kutime bonanima viro, estas kapabla ekkoleri kiel maljuna bovo, se lia milda edzino riskas rearanĝi lian skribtablon.

Kaj li promenas en ĉambro, kaj kun pedanta ruzo kontrolas per sia fingro, ĉu restis polvo sur la nigra kovrilo de piano.

En vespero li revenas, malsata kaj nervekscitita. La edzino kuras de kuirejo al manĝoĉambro, kaj de manĝoĉambro al kuirejo kaj prizorgas ĉion. Okaze la edzo povas diri:

»Mia patrino stufis ĉi tiun porkaĵon pli bone ol vi, kaj spicis ĝin pli delikate Mi memoras, kiam mi estis ankoraŭ infano, mi ŝatis multe tiun kuiraĵon... Jes, jes...»

Kaj poste, kiam kaldronoj kaj botoj estas denove lavitaj kaj la malgranda, lacega edzino eksidas sur seĝo por paroli kun edzo kaj rakonti pri la okazintaĵoj de la tago, la edzo aŭ volas legi siajn ĵurnalojn, aŭ aŭskulti al la radio.

Por edzino laboroj mankas neniam. Ŝi blanklavas tolaĵojn, gladas, bakas, kudras, kaj retrikas ŝtrumpojn. Kelkfoje truoj estas tiel grandaj kiel kapo de katido. Ne — ŝi vere ne povas ridi kiel Sara!...

Se okazas miraklo, kaj edzo ofertas sian helpon — li certe disrompas ion kaj renversas supon aŭ saŭcon sur tablotukon, kaj se li ofertas bati najlon en muron, li nur ordonas, postulas kaj krias. Estas pli multe da bruo ol helpo. Aŭ li vundas sin.

Ankoraŭ en lito tio daŭras. La edzino volas dormi, sed la edzo bruligas malbonodoran pipon, legas kaj ne volas estingi la lampon. Sed en momento kiam la kompatinda virino jam dormetas, li komencas paroli: »Aŭdu, ĉu vi ne volas iomete interparoli kun via kara edzo? Ĉu?» Kaj li puŝas la edzinon je la flanko. Kaj tiel sekvas tagon post tago. Oni ne povas diri ke estas kaŭzo por ridi. Prefere estas kaŭzo por plori...

Ĉu ne?

Irene

*) La verkintino tamen eraras: Ŝi verŝajne memoras pri la Evangelio S. Mateo, 1:2, sed tie estas legeble: Al Abraham naskiĝis Isaak... Same en la Malnova Testamento, Genezo, 1:4: : Kaj Adam ekkonis Evan, kaj ŝi gravediĝis kaj ŝi naskis Kainon, aŭ Gen. 10:13 : Kaj Micraim (la filo de Ĥam) naskigis la Ludidojn... Evidente la tasko de viroj ĉiam estis nur ekkoni virinon kaj naskigi, dum la resto de la laboro apartenis al virinoj. Noto de la kompostisto.

### KORESPONDA SERVO MONDSKALA

La koresponda servo ricevis novan gvidanton, kiu promesas bone prizorgi la taskojn. Sekve, dezirante korespondanton, bonvolu sendi vian anonciĝon al
f-ino C. Hueter
12 rue de Jacobins
CLERMONT-FERRAND (P. de D)
Francujo

Ni aludas al la reguloj publikigitaj en EF n:o 4/1960 (p.27). Se vi volas rekte ricevi adreson de korespondanto, sendu po 1 respondkuponon por ĉiu adreso dezirata, samtempe informante ĉion pri via persono kaj interesoj.

La Skolta movado de Finnlando iĝis 50-jara dum la pasinta jaro. Ĉar ni Esperantistoj sentas, ke la skoltismo havas multajn samspecajn idealismajn celojn, kiel la Esperantismo, estas eble oportune mallonge trarigardi la evoluon de tiu movado ĉe ni.

La ideo de laborado inter knaboj — ĉar temis en la komenco nur pri knaboj — naskiĝis samtempe en du lokoj, nome en Anglujo kaj en Usono. La Usona flanko ne estas ĉe ni tre konata, sed fakto restas, ke la laborado kun knaboj en skolta maniero komencis tie jam en la plej unuaj jaroj de nuna jarcento. Fama naturesploristo kaj verkisto Ernest Thompson Seton faris kun kelkaj knaboj tendaron en indiana maniero. Li donis al tiuj knaboj diversajn taskojn, per kiuj ili povis atingi diversajn rangojn, kiuj estis laŭ indiana kutimo indikitaj per kolorigitaj plumoj. La unua tia »indiana tendaro» fondiĝis, ĉar la alestantaj knaboj estis tre ofte trovataj en iu ĝardeno — ŝtelante pomojn! Tian senpripensan kaj infanecan ŝteladon volis Seton eviti simple donante al la uletoj pli bonan kaj pli interesan farindan. Sekvo estis, ke la noblaj indianoj tute ne volis ŝteladi pomojn — tia ja estus estinta degradiga faro por tiaj praarbaraj nobluloj — ili eĉ tre entuziasme kaj kun konsiderinda efiko gardis la ĝardenon kontraŭ aliaj ŝtelemuloj! Dum la paso de kelkaj jaroj la nombro de tiaj »Setonaj Indianoj» rapide kreskis, tiuj aperadis kiel fungoj post varma »indiansomera» pluvo, kaj ili eĉ relative frue havis komunan asocion. Por doni unuforman bazon al la komencanta movado, Seton verkis libron, en kiu li priskribis vivon en la indiana tendaro, kaj donis postulojn por diversaj plumoj. La libro nomiĝis »Two little savages» (Du sovaĝuletoj), kaj oni povas konstati, ke ĝi estas unu el la plej inspirigaj kaj ĉarmaj porknabaj libroj verkitaj. Oni povas ĝin havi ankaŭ en la finna lingvo sub la titolo »Kaksi partiopoikaa». Bedaŭrinde esperantlingva traduko ne ekzistas. Do, iaj aferoj okazadis en Usono dum la plej unuaj jaroj de nia jarcento. Sed en la malnova mondo okazadis ankaŭ aferoj.

Dum la Boara milito en suda Afriko angla generalo Robert Baden Powell akiris bonajn rezultojn uzante junajn knabojn en diversaj taskoj ĉe militagoj. Poste, kiam la milito jam finiĝis, Baden-Powell, baziĝante sur siaj spertoj en la mondo knaba, starigis por knagoj tendaron en iu insulo en Anglujo. La rezulto estis egale bona kiel tiu de Setonaj tendaroj en Usono. Generalo Baden-Powell verkis libron, Scouting for boys, kiu estas eĉ hodiaŭ bazodona verko de la tuta skolta movado.

Poste Baden-Powell kaj Seton renkontis unu la alian, kaj rimarkis, ke ili ambaŭ startis tre similaspektan movadon. Ili interkonsentis pri la sekvo, kaj la Setonaj Indianoj transformiĝis samtipaj skoltoj, kiel la Anglaj. Tiamaniere oni akiris bezonatan unuformecon, kvankam la aliformiĝo de amerikaj skoltoj siatempe ne okazis tute sen frikcio. Dum siaj maljunaj jaroj Ernest Thompson Seton eĉ pentis, ke li ne daŭrigis sian movadon tute sendepende, lia opinio estis, ke Baden-Powell militarigis la tutan aferon. Fakto restas, ke Seton tute sin flankenlasis, kaj ne plu, post la internaciigo de la movado, iel agadis en ĝi. Tamen, se la Amerika skoltado estus daŭriĝinta en la origina Setona maniero, ĝi estus estinta tiel specialeca, ke ĝi ne estus estinta konvena membro por internacia movado, indianoj ja ne ekzistis

en aliaj landoj. Kaj de tiu ĉi starpunkto rigardate, estis ja feliĉa afero, ke la movado direktiĝis en la maniero intencita de Baden-Powell.

En tre mallonga tempo la skoltismo disvastiĝis en Anglujo, kaj iom poste trafiltriĝis ankaŭ alilanden. Ĉie oni vidis, kiel granda eduka valoro estas en libera agado laŭ tiaj — ideaj kaj praktikaj — principoj, kiel en la skoltado. Ekzemple la rusa Caro simple ordonis armean ĉefstabon prepari kaj eldoni tradukon de Scouting for boys, skoltado por knaboj. Sekvo estis, ke skoltismo disvastiĝis treege rapide en Rusujo. Ankaŭ en Svedujo oni fondis la unuajn klubojn, aŭ flagrondojn, kiel ili nune laŭ skolta maniero ĝenerale nomiĝas, jam en 1909. De tie verŝajne la ideo transvenis ankaŭ en nian landon. La unua flagrondo establiĝis en Alando jam en 1910. (Pri tio oni multe diskutadis, kelkaj aliaj eblecoj ekzistas, ĉar neniaj certaj notoj restas; aliaj opinias, ke la unua flagrondo estis en Porvoo, sed tio ne estas certa. La demando de la unua flagrondo tamen estas tute sensignifa, la loko ne gravas, la tempo estas ĉefafero, kaj ĝi estas certe 1910). La nombro de flagrondoj kreskis rapide, kaj en rapida sinsekvo ili naskiĝis, tute spontane, sen ia oficiala startado, startago. Ŝajnas, ke flagrondoj formiĝis en la lokoj, kie oni povis havigi al si la Baden-Powell'an libron aŭ en originala formo, aŭ en sveda traduko. Tuj tre granda entuziasmo ekregis. Entuziasmo estas ĉiam ligita kun la skoltado. En tiuj, unuaj, tempoj oni ĝin precipe bone komprenas, estis ja demando pri io tute nova, tute sen precedo. Dum unu jaro la nombro de flagrondoj kreskis ĝis kelkdeko. La Baden-Powell'a libro ne aperis en finna lingvo, nur mallongigita eldono en 1911. Manko de konvena manlibro eble estis la ĉefa kaŭzo al la multfaldeca aspekto de la movado ĉe ni. Ne ekzistis iaj difinitaj agadformoj, kaj sekve ĉiu flagrondo havis eĉ siajn proprajn markojn kaj uniformon, se pri uniformoj oni jam povis paroli. La skoltado tamen jam trovis siajn plej gravajn kampojn de instruado: la skoltoj havigis al si sciojn kaj lertecon en unuahelpaj aferoj, en signalado, sporto, gimnastiko, tendumado kaj arbara ekskursado. Ankaŭ la skoltoj partoprenis ĝeneralan helpan agadon, ili helpis al filantropaj asocioj disvendante markojn aŭ loteriajn biletojn kc. Finsomere 1911 estis la nombro de finnaj skoltoj kreskinta ĝis la estimenda numero 6000, eble pli. Ree ni povas nur konstati la fakton, ke pri ia certa nombro ni ne scias, ĉar nenia ligo ekzistis, kiu estus farinta statistikon.

La skoltado estus nun estinta en tre floranta stadio, se kelkaj faktoroj ne estus estintaj kontraŭaj al ĝi. Finnlando ne estis — bedaŭrinde — libera lando, ĝi apartenis al la granda Rusa Imperio kiel aŭtonomia grandduka lando. Ĝuste dum la jaroj, kiam la skoltado enradikiĝis en la finna tereno, ekfloris en la rusa »Dumo» (parlamento) ideo pri finigo de Finnlando. »Finis Finlandiae» estis la devizo. La rusa gubernisto en Finnlando vidis en la ĉiam kreskanta skolta movado forton, kiu eble — dum ĝi kreskigis diversajn virtojn — estos kontraŭa al tia projekto pri likvidigo de unu tuta nacio. Do sekvis decido, sub preteksto de »penso pri plejbono de la junularo... estas ĉie nekompetantaj skoltestroj... ktp», ke la skolta movado finiĝu kaj estu deklarita kontraŭleĝa. 22. 9. 1911 estis la tago, post kiu ĉia skoltado estis malpermesita. Al la skoltoj tia dekreto nature estis korprema afero, tamen, spite de iom akraj kontraŭagoj kun eĉ forportoj al Siberio, kelkaj flagrondoj daŭre agadis sub iu aŭ alia kaŝnomo, kaj subtere. Stranga estis la fakto, ke skoltado daŭre floradis en la resto de Rusa Imperio, eĉ subtenate de la Caro mem. La nombro de skoltoj en Rusujo ja kreskis al la nombro de 50.000, sed skoltado tie finiĝis de

la revolucio dum la unua mondmilito. La revolucio alportis ankaŭ pli da libereco en Finnlando. Tio estis bona afero nature por la tuta lando, kaj por la skoltoj ĝi havis grandan valoron. Tuj post la detronigo de la rusa Caro eknaskiĝis la unuaj novaj flagrondoj, kaj subtere agintaj ree aperte kaj senkaŝe laboradis. La agadon partoprenis parte la veteranoj de antaŭa agadperiodo antaŭ ses jaroj, kaj ankaŭ tute novaj, pli junaj freŝuloj. Jam printempe 1917 oni fondis komunan ligon, kio ja estis tre sana aranĝo, ĉar alie estus dum tre mallonga tempo la tuta grandamasa entuziasma anaro sen bonaj direktiloj disfluginta kaj malaperinta. Tre forta kreiĝis la movado, sed ree ĝi suferis pri sorta bato, kiu ankaŭ kaŭzis multan suferadon por la tuta finna popolo. La novembra revolucio de Rusujo kun ĝiaj sekvoj igis la finnan laboristan movadon en krizostaton, kaj kelkaj laboristpartianoj volis fari Finnlandon parto de nova, grandespera Sovet-Unio. Tio ne plaĉis al aliaj finnoj, ne al ĉiuj laboristoj eĉ, kaj sekvis sanga kaj kĉiatrajte bedaŭrinda interna milito. Skoltado kiel nepolitika movado havis nenian sintenon je la afero, sed multajn skoltojn la bataloj forprenis dum la peza oferrikolto, interna batalado tiurilate estas ĉiam plej sangopostula. La rezulto de la milito estis, ke Finnlando fariĝis sendependa lando, kun altgrada demokratio; la Soveta-Finnlando ne naskiĝis. Dum la unuaj jaroj de libera finna regno kreskis kaj plifortiĝis nia skolta movado tre forte, kvankam okazadis, ke socialist-familioj ne permesis al siaj infanoj partopreni la agadon. Eĉ nun ekzistas iom da falsa opinio, ke skoltado estus iamaniere politika edukado, celita kontraŭ »demokratio» aŭ laborista movado. Tamen, fakto estas, ke ĉe skoltado ĉia politikado estas malpermesita, kaj plej zorgeme evitata, la principo estas, ke infanoj ne politikadas, ili men decidu sian socian sintenon nur estante plenkreskaj, kiam ili estas sufiĉe aĝaj mem kompreni pri la aferoj. Tia principo, kiu baziĝas sur bonaj demokrataj kutimoj, ne estas konata inter diversaj politikaj junularaj kaj infanaj movadoj, kiuj konkurencas kun skoltismo, ekz. tn pioniroj.

La agado trovis novajn formojn, pliprofundiĝis kaj disvastiĝis ĝis la »ora» jardeko de 1930—1940. Tiam komenciĝis ankaŭ por skoltismo tre favora tempo. Oni kreis — aparte por knaboj kaj knabinoj — distriktan organizon, kiu multe helpis al lokaj flagrondoj en la laboro. Per rekta kontakto inter flagrondestroj kaj distriktaj gvidantoj oni bele akcelis agadon kaj donis bonan unuformecon al ĝi. La materia bonfarto de koncernaj jaroj kaŭzis, ke multaj flagrondoj sukcesis havigi al si diversspecan ilaron, ekzemple tendojn, kaj ankaŭ al unuopaj skoltoj estis pli facile ricevi bezonatan materialon, uniformon, tornistrojn kaj alian tenduman ilaron. Ankaŭ la agado kun pli junaj infanoj, ĉe knaboj la t.n. »lupida»-agado, komenciĝis tiam. Oni publikigis finnlingvan Lupido-libron, kaj en la plej viglaj kaj larĝaj flagrondoj ekzistis tiaj Lupid-sekcioj, ĉe kiuj la junaj knaboj sin preparadis por la »grandula skolteco». Dum tiu fruktodona jardeko la skoltado ĉe ni estis eble plej videbla, eble pli videbla ol nun, kvankam la membraro hodiaŭ estas multe pli multnombra. Dum tiuj jaroj la skoltoj faris grundodonan laboron sur multaj kampoj de socia bonfarado, kiel ekzemplo, nur la 1935 grundita »Sangoligo», el kiu poste, precipe dum la militoj, formiĝis la ampleksa Sangoservo de la Ruĝa Kruco.

Kiam la Sovet-Unio en 1939 atakis Finnlandon, devis nature ĉiu eĉ kapableta finno streĉi siajn fortojn ĝis ekstremo por la komuna nacia milita eforto. Tiam ankaŭ ĉiuj plenkreskaj skoltestroj devis teni sian lokon

en la armeo. Ĉar tiun ĉi militon sekvis alia, pli longa, estas klare, ke la movado perdis multajn el siaj plej bonaj fortoj. Multloke la flagrondoj ĉesis funkcii, kaj aliloke tiujn prenis tre junaj knaboj sub sia gvido. Tamen — la movado estis en tuta preteco por daŭra antaŭeniro, kiam la milita tempo fine estis nur doloroplena historio. Sed multaj skoltoj perdiĝis en la milito.

La postmilitaj jaroj estas estintaj tiuj de konstanta evoluo kaj kresko. La nombro de knaboskoltoj estas nun ĉ. 35.000, kiam ĝi en 1936 estis malpli ol 10.000! Tamen, strange, ŝajnas ke la movado en 1936 estis multe pli videbla ol nun. Estas eble komuna fenomeno por ĉiuj idealismaj movadoj: nuntempo estas tiel materialisma, ke ideoj ne estas tiel facile videblaj kiel diversaj elektraj maŝinoj. Cetere, la »kolera» junularo, kiu multe bruas, vekas pli da atento ol diligente kaj senbrue laborantaj skoltoj aŭ aliaj klubanoj ideaj. Estas bona, esperdona afero scii, ke ni havas tiel grandan nombron da skoltoj, ĉar la eduka valoro de skoltado ne malkreskis dum la jaroj — kontraŭe oni povus diri, ke la skolta agado nun estas multe pli bezona, grava, ol iam pli frue ajn.

* * *

Kiel malgranda postrimarko estu rakontata, ke Baden-Powell mencias pri Esperanto en sia libro Skoltado por knaboj. Li diras, ke estas facile lerni la lingvon, kiun oni inter la skoltamikoj povos uzi kiel kaŝlingvon, kiun ĉiuj fremduloj ne komprenas. Kaj ĉar la lingvon parolas multaj homoj en multaj landoj, ĝi samtempe kiam amuza, estas ankaŭ utila.

Ekzistas ankaŭ Skolta Esperantista Ligo, kies celo estas enkonduki la Esperantan ideon al la mondo Skolta, kaj reciproke la ideon Skoltisman al la mondo Esperantista. Ni esperas, ke tiuj ĉi du ideoj trovu sian komunan vojon, ĉar tiamaniere kreita »geedzeco» nepre devos esti feliĉa.

A r v i k o l o

## JULIO BAGHY 70 JARA

La 13-an de nuna januaro fariĝis 70 jara Julio Baghy, unu el niaj plej brilaj orginalaj verkistoj, talenta en prozo kaj poezio kun inventemo kaj riĉa lingvo, verva idealisto, kelkfoje serioza, alifoje satira. Kore gratulante la jubileanton, ni rekomendas al ĉiu esperantisto legadon de liaj verkoj, al kiuj almenaŭ jenaj estas nuntempe riceveblaj per Esperanto-Libraro: Verda Koro, ĉarma facila legaĵo por komencantoj, Sur Sanga Tero, el vivo de militkaptitoj en Siberio, kie Baghy restis dum kaj post la unua mondmilito, Teatra Korbo, unuaktaĵoj, kaj la ĉarme bela poezia dramo Sonĝe sub Pomarbo. Ankoraŭfoje: Koran gratulon !

V S

★★★

### KOMPRENIS

Oni rakontis anekdoton pri du profesoroj, eminentaj kuracistoj, kiuj tre ĵaluze rivaladis en la profesio. Foje tiuj du hazarde renkontis ĉe fervoja stacio. La unua diris, en afabla tono, al la alia: »Kara kolego, mi vidas el via trajnbileto, ke ni vojaĝas en la sama trajno, tamen mi devas bedaŭri, ke ni ne povas kune sidadi, ĉar mi mem havas bileton en la unua klaso, kaj mi, ree el via bileto, vidas, ke vi vojaĝas duaklase. Tion mi ne povas fari, ĉar mi havas tiel multe da pacientoj, ke certe kelkaj min konsultus en la trajno, nature kvazaŭ konversacie, kaj sen pago. Jen kial mi ne povas sidi en la dua klaso. Certe vi komprenas?» Al kiu la dua eminenta kuracisto respondis mieltone: »Certe, kara kolego, mi tion bone komprenas, mi havas precize la saman kialon vojaĝi en la dua klaso anstataŭ la unua.»

## KOREKTO

En la 9an numeron de pasinta jaro enfiltriĝis bedaŭrinda preseraro: la adreso de Esperanto-Libraro estas ja nun Pajupillintie 26 A 1, Etelä-Kaarela, poŝtĝiro 6117, kaj telefono 43 32 51.

## KORESPONDEMULOJ

Ree kolektiĝis areto da korespondo-anoncoj en la tirkeston de la redakcio. Nun estas bona ebleco havigi al si korespondan amikon en eksterlando.

Georgi Černišov, (24-jara studanto)
8 e poĉtove otdelenie,
do vostrebovanija,
ROSTOV n/D- 8, USSR

F-ino Soile Lingman
Västmannagatan 29 IV
c/o Stadtlander
STOCKHOLM, Sverige
(Volas korespondi kun finna esperantisto ĉ. 20—30 jara)

Soós Zoltán (16-jara junulo)
Aprilis 4 str. 44
SZEGED
Hungarujo

Vladimir Gorazeev,
Opitnij uĉastok,
Abonem. jaŝĉik N:o 25
MAGADAN
USSR
(Sro Gorazeev estas preta helpi, se vi studas la rusan lingvon. Cetere li interŝanĝos esperantajojn, gazetojn ktp.)

Olga Andriejevaité (17-jara oficistino)
Sporto 15
MOLÉTAI
Litova SSR,
USSR
(Korespondas kaj interŝanĝas poŝtkartojn)

Leif Heilberg, (28-jara)
447 Cole Street
San Francisco 17
Calif. U.S.A.
(Korespondas pri naturistaj temoj, pri organizo de grupoj en UEA kaj INF.)

Gaspare Bracchi,
Via Caimi 8
SONDRIO 4
Italia
(Volas korespondi per sonbendoj kun student(in)o pri diversaj temoj. Unua kontakto perletere)

Marius Dastych (19-jara studento)
ul. Kraszewskiego 56/7
TORUN
Pollando
(volas korespondi kun samidean(in)o precipe el Helsinki, proponas ankaŭ gastigon ĉe li)

Vladimir Belajev
Ul. Polejajeva, 3/30 K.V. 38
Groznij, KAGKAZ,
USSR
(Sro Belajev estas artisto de Drama teatro, kaj volus korespondi kun iu, interesiĝas pri artoj)

Ilia Viĉev
At. Linkov 4
PLEVEN
Bulgaria
(Li volas korespondi kaj interŝanĝi i.a gramofonajn diskojn)

Oscar Hoff
Rua Ferreira Penteado, 276
CAMPINAS
Brazilo

Kursanoj de Internacia Amikeca Ligo deziras korespondi kun finnaj esperantistoj. Instruisto: Antonio E. Sllivan, 17 Willcott road, ACTON W3, LONDON.

## INTERNACIA POŜTMARK-EKSPOSIZIO EN BUDAPEST 1961

Petu prospekton kaj interesiĝu pri esperantistafilatelista fakkunsidu! Adreso: Filatelista Asocio /Landa Azocio de Hungaraj Filatelistoj/ Budapest 4 53.pf.164. Hungarlando

## UNIVERSALA LIGO

Ankaŭ la kotizo de UL estas plialtigita ekde la nova jaro. Ĝi estos minimume 33 steloj (anstataŭ la nuna 25 st.).

UL farigis por la jubilea jaro metalajn stelomonerojn de la valoroj 1, 5 kaj 10 steloj. Ili estas vere belaj memorajoj. Se vi volas ilin havi, mendu de mi: la registrita sendokosto estas 4 steloj. En la sama sendaĵo vi povus mendi 1-stelajn monbiletojn, iun kvanton por via uzo (pli avantaĝaj ol la internaciaj respondkuponoj!), sen plia sendokosto.

Ĉu vi jam konas la plej valoran literaturan revuon en Esperantujo: NORDA PRISMO. Se ne, petu de mi senpagan specimenon kontraŭ la afranko, 20:—. La jarabono kostas 650:—.

Joel Vilkki

Ĉu Vi jam reabonis
ESPERANTA FINNLANDO?

Kokemäki 1961 — Satakunnan Maakunta Oy

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL